„Mutig vorwärts!“ **Aŭstria Esperantisto** „Kuraĝe antaŭen“

Aŭstria Esperantisto
(Österreichischer Esperantist)

Oficiala organo de Int. Esperanto-Muzeo kaj Aŭstria Esperanto-Asocio

11a jaro. N-ro 10 — Monata — Oktobro 1934

Redaktejo kaj Administrejo: Wien, I., Neue Burg (Tel. R 27-803).

Konto bei der Postsparkasse D-123.826

Jarabono (komencebla ĉiumonate): Por aŭstrianoj aŭ Ŝ 3.90, germanlandanoj RM 2.75 alilandanoj sv. fr. 3.50; ponumere: por enlandanoj 35 aŭ. g., eksterl. 45 aŭ. g.

Nicht zeitgerechte Abbestellung unseres Organs verpflichtet zum Weiterbezug.

Aus aller Welt.

Der König der Belgier Ehrenpräsident der Belgischen Esperanto-Liga. Der belgische König Leopold III. war schon als Herzog von Brabant Ehrenvorsitzender der Belgischen Esperanto-Liga. Nach der Thronbesteigung ließ er die Liga durch Schreiben verständigen, daß er auch als König den Ehrenvorsitz weiter behalte und die Förderung des Esperanto fortsetzen werde.

Die **Messe von Marseille,** Frankreich, versendet in Esperanto Einladungen zum Besuche.

Die **Radio-Station Eiffelturm-Paris** sendet jeden Samstag ein Kabarett-Programm in Esperanto.

Die **Reichenberger Messe** ladet vermittels Esperanto Plakaten und Esperanto-Verschlußmarken zum Besuch ihrer Messe ein.

Die **Mustermesse von Rio de Janeiro,** Brasilien, hat soeben zur Werbung (12. August—15. November) einen vielfarbigen Prospekt in Esperanto mit 36 Bildern und Ausstellungsterrain-Plan herausgegeben.

Am **24. Juni** sandte die **Station Huizen,** Niederlande, ein Weltprogramm, dem 209 Sender angeschlossen waren. Die Ansage und die Erklärungen des Programmes waren in Holländisch, Französisch, Englisch, Deutsch, Spanisch, Italienisch und in Esperanto.

Ein **Esperanto-Ehepaar** in Prag heiratete nnd der Weihbischof von Prag Dr. Anton Eltschkner selbst traute das Paar und hielt seine Ansprache in Esperanto.

In der Zeitung **„Der deutsche Esperantist, Berlin“**, dem Organe des Deutschen Esperanto-Bundes nimmt Walther Hahn, Schulleiter in Gohlis bei Dresden, Mitglied des Führerrates des DEB, in einem langen, sehr interessanten Artikel Stellung zur Verwendung des Esperanto und sagt, daß durch Verwendung des Esperanto seinem Vaterlande Deutschland wertvolle Hilfe geleistet werden kann und daß Deutschland auf dieses wertvolle Hilfsmittel — seiner Überzeugung nach — nicht verzichten kann.

Zusammenfassend stellt er fest:

1. Die Verwendung des Esperanto wird dazu beitragen, wirtschaftliche Schwierigkeiten zu überwinden.

Also; Wirtschaftsoffensive durch Esperanto!

2. Die Verwendung des Esp. wird helfen, die Welt über das neue Deutschland und die hohen Ziele des Nationalsozialismus aufzuklären und Widerstände des Auslands zu beseitigen.

Also: Aufklärungsoffensive durch Esperanto!

3. Esp. wird in der Schule bis zum praktischen Gebrauch erlernt, erfüllt die Aufgabe der formalen Bildung und befreit von der Last des fremdsprachigeu Unterrichtes zugunsten der körperlichen Ertüchtigung der Jugend.

Also: Esperanto in die Schulen!

Radio-Esperanto-Auslandsdienst:

24. Oktober: Lothar Steiner „10 Jahre Radio Wien“ (z. Verfügung gestellt von Generaldirektor Czeija).

31. Okt.: G. E. Bernfeld „Die Hofburg“ (z. V. g. vom Bundesministerium f. Handel).

7. Nov.: Reg. Rat Hugo Steiner „Lettland“ in deutscher Sprache und Esperanto. Austauschvortrag.

14. Nov.: Dr. Alf. Engländer „Die Bundesverfassung Oesterreichs“.

Veranstaltungen:

20. Oktober, 19 h 30 im Klubsaal der Urania Liederabend Maria Neubauer mitwirkend **Maria Fiedler** (Klaviervorträge) Max Januschke (Begleitung der Gesänge). Mitglieder S 1.50, Nichtmitglieder S 2.—

24. Oktober, 20 h, Kleiner Musikvereinssaal Klavierkonzert **Peter Stadlen** Preise von S 2.— bis 8.—

Ĉiuj vojoj kondukas al Roma!

(certe en 1935 al la XXVII-a!)

Roma! Tiu nomo sufiĉas, por entuziasmigi miajn samlandanojn, streĉi ĉiujn fortojn, por havigi al si la necesan monon por partopreni en ĉi tiu certe unika kongreso! Ŝparu, malkovru novajn monfontojn, por ke via arda deziro „Al Roma, al Roma!“ estu plenumota!

La italoj ĉion preparos plej bone, ili klopodas ĉion aranĝi kiel eble plej malmultekoste! Anoncu vian aliĝon al mi, ĉar mi aranĝos certe karavanon al Roma, en kiu partoprenos aro da alilandanoj. Ni veturos komune al Klagenfurt, tie ankaŭkongresos kaj daŭrigos la vojon al Venezia, de kiu belega urbo la italoj estos niaj gvidantoj!

Baldaŭ vi ricevos pli detalajn informojn!

Steiner.

Kion ĉiu kongresonto devas scii el la itala lingvo.

Malgraŭ la bela optimismo, kiu subtenas nian entuziasmon, ni ne estas sufiĉe naivaj por supozi, ke venontjare ĉiuj italoj flue parolos E-on. Tial ni petis kelkajn klarigojn pri utilaj kaj necesaj vortoj aŭ esprimoj itallingvaj. Ni rekomendas, ke la kongresontoj, studu tre serioze la sekvantajn lecionojn:

Amerikano (elp. »k«). . . Ano de Ameriko, sed ankaŭ . . . kaj pli facile trinkebla . . . ruĝa aperitivo, konsistanta el miksaĵo de aromaj vermutoj kun kelkaj gutoj da maldolĉa likvoro. Oni aldonas Selz-akvon, kaj en tiu fluidaĵo ĝenerale troviĝas peceto da cintronŝelo, kelkfoje intence enmetita.

Asti. . . . Urbeto en la Piemonta regiono, kiu enhavas 40.000 geloĝantojn, sed neniun delegiton de UEA. Domaĝe, ĉar la urbeto estas nepre vizitinda, almenaŭ por kontroli la delikatecon de la tieaj muskatvinoj . . . Feliĉe, specimenoj de la ŝaŭmanta »Asti spumante«, kiu iom similas al Ĉampano, estas troveblaj ankaŭ aliloke.

Barbera . . . Nigreruĝa, kutima enboteligita, trinkinda vino.

Barolo . . . Sama difino kiel por la »Barbera« sed . . . gustumante la du ŝatindajn vinojn kaj saĝe komparante . , . oni konstatas diferencon!

Becco (elp. bek-ko). . . . Tiu vorto havas tri sencojn: Unue ĝi signifas birdan bekon, . . . due virkapron kaj trie, iom ĵargone, perfiditan edzon. La lasta estas la plej ofta.

Bel pezzo di ragazza (elp. bel pec-co di ragac-ca) . . . Bela peco da fraŭlino, per tiuj vortoj oni aludas ne al iu speciala aparta parto de la fraŭlino, sed eldiras favoran juĝon pri la fraŭlino kompleta, laŭ ĉiu vidpunkto.

(El »Pirato-Paris«) Daŭrigota.

De la Dachstein mont'. . .

(Hoch vom Dachstein an . .)

De la Dachstein mont' — alta aglo-tron' —
Ĝis la venda land' ĉe l' bord' de l' Sav',
De la Mürz-torent' en alpejkanton'
Ĝis la vinberland', — fluej' de l' Drav':
/: Ci belega land', la Stiria land'
Estas mia kara hejma land'! :/

Kie saltas ĉam' sur la roka mur',
Grimpas la ĉasist' en la arbar',
Kie paŝtistin' jodlas pro plezur'
En ĉieltuŝanta altmontar':
/: Ci belega land', la Stiria land'
Estas mia kara hejma land'! :/

Kie per labor', fajro kaj martel'
Feron gajnas hom' el sankta ter',
Kie abiar' kreskas al ĉiel'
Kaj eĉ spitas al venteg-koler':
/: Ci belega land', la Stiria land'
Estas mia kara hejma land'! :/

Kie la fidel' de germana gent',
Kredo, virto kaj la vira glor',
Sur knabina vang'! la hontema sent',
Ĉiam restas la mastrin'-fervor':
/: Ci belega land', la Stiria land'
Estas mia kara hejma land'! :/

Trad. Karl Franz.

„Pola Esperantisto“ publikigis en sia numero 8/9 longan artikolon „La martira morto de d-ro E. Dollfuß“, verkita de prof. d-ro Bujwid, kaj **„Heroldo de Esperanto“** en sia numero de l' 9. sept. „Kaj-1936 en Vieno“, en kiu artikolo la verkinto memoras la grandajn servojn, faritajn de la unuopaj membroj de la aŭstria registaro kaj kondamnas la murdigon de d-ro Dollfuß. Je la fino estas transdonataj al nia ŝtatprezidanto, la registaro kaj la familio de d-ro Dollfuß plej sinceraj kondolencvortoj.

Ni dankas al la verkintoj kaj al la nomitaj gazetoj!

Nova Krestomatio

de la lingvo Esperanto.

Spegulo de ĝia lingva kaj literatura evoluo dum unu kvaronjarcento 1905—1930.

Digna kompletigo ĝi estu al la Fundamenta Krestomatio, al kiu ĝi ankaŭ similos ekstere per sia amplekso kaj aranĝo de la tekstoj.

La du redaktoroj d-ro Koloman Kalocsay, Budapest kaj d-ro Emil Pfeffer, Wien turnas sin al la esperantistoj kun la peto, ke ili kunlaboru, serĉante en siaj bibliotekoj taŭgan materialon kaj komunikante tiun al la adreso „Literatura Mondo“, Budapest, IX. Mester-utca 53, V, 5 kun alsendo de l' koncerna kontribuaĵo kaj preciza font-indiko, kiu literaturaĵo — ĉu en prozo aŭ poezio — devenanta el la nomita epoko, laŭ ilia opinio meritas nepre esti envicigota en „Nova Krestomatio“.

MUDr. Adolf Bischitzky

en Prag mortis la 30. de aŭg. 1934.

Li estis multjara pioniro de E. inter la germanoj kaj fondis 1908 kun prof Lederer kaj inĝ. Boschan en Prag E.-unuiĝon „Verda Stelo". De post 1911 ĝis sia morto li estis ties prezidanto.

Li estis ankaŭ membro de Kuratora Komitato de IEMW.

Koran kondolencon al la vidvino, Germana E.-Ligo en Ĉeĥoslovaka Republiko kaj „Verda Stelo".

IEMW AEA

D-ro H. Orthal, Nürnberg †

Nur 56-jara nia pioniro d-ro H. Orthal mortis la 19. de julio en Würzburg, kie li serĉis resaniĝon.

Dum 25 jaroj li laboris por E. en Nürnberg, kie li estis del. de UEA, kunfondinto de E.-grupo kaj de Bavara Ligo, kunlaborānto en la konsilantaro de GEA, ano de Ekzamena Komisiono de Germana E.-Instituto kaj de LKK de la XV-a.

Persone bonega homo, nobla karaktero, ĉiam helppreta; la esperantistaro tutmonda havas kaŭzon plori pro lia foriro el nia mondo.

Mi persone perdis longjaran bonan E.-amikon. IEMW., AEA.: Steiner

Grandstila varbado por Esperanto dum la foiro de Reichenberg.

Germana E.-Ligo en Ĉeĥoslovakio jam antaŭ 15 jaroj sukcesis enkonduki E-on ĉe la Foiro kaj tiu uzas E-on de tiu tempo por korespondaj kaj praktikaj celoj. Dum la aŭtuna foiro estis ĉe la stacidomo tabulo oficiala en 4 naciaj lingvoj kaj en Esp. „Informoj por eksterlandanoj"; sur la loĝeja oficejo la ofic. surskribo en Esp.; ĉe la foira oficejo sur tabulo inter aliaj „Esp.-Abteilung; Esperanto-Fako"; en la foira katalogo diversloke en formoj de grandaj anoncoj „La moderna komercisto uzu Esperanton! Informojn donas la E.-Fako de la Foiro Reichenberg". . . . . . Krom tiuj oficialaj surskriboj estis videblaj varbaj aranĝoj de GEL en la urbo, en la foira tereno kaj en la foiraj haloj; en la plej impona hotelo Imperial en granda elmontrejo ekspozicio „Varbado por fremdultrafiko per Esp.„; sur la ĉefplaco apud la urbdomo estis starigita grandega triangula ruĝa kolono kun la okulfrapa germana surskribo sur ĉiuj flankoj: „La ŝlosilo por la plej granda simpligado en negoco kaj trafiko kun esterlando estas Esperanto"; en la foira tereno staris sur tre frekventata loko naturgranda semaforo kun la surskribo „Libera vojo al Esp.". En la diversaj foiraj haloj pendis 6 m longaj kaj 1 m larĝaj tabuloj kun jenaj tekstoj: „La moderna komercisto uzu E-on!", „Racionigo estas postulo de la tempo. Esp. ankaŭ estas formo de racionigo", „Esp. ŝparas al vi tempon kaj monon", „La tekniko superas la spacon, Esp. la lingvajn malfacilaĵojn." En la grandstila ekspozicio „La Komercisto" estis belega, bone aranĝita Esperanto-stando. Ni gratulas niajn samideanojn en Reichenberg kaj unuavice al la prezidanto de GEL, nia pioniro prof. inĝ. Scholze, elkore kaj kiopodos imiti ilin!

Esprimo de estimo ĉe diversaj nacioj.

La esprimo de estimo devenas el timo de malfortuloj antaŭ fortuloj kaj nur pli malfrue ĝi disvolviĝis en esprimon de admiro, eventuale de amo kaj aliaj rilatoj.

Kelkaj esprimoj de estimo ĉe diversaj nacioj vekas ĉe ni rideton aŭ malsimpation, kaj kelkajn oni eĉ ne povas klarigi.

La tiel nomata civilizita mondo demetas ĉe esprimo de estimo la kapvestaĵon. Katolikoj venas en preĝejon kun kapo nekovrita, dum ĉe judoj la nekovrita kapo signifas en iliaj preĝejoj malestimon, kaj en la moskeoj de turkoj eĉ nepardoneblan ofendon, kiun oni ankoraŭ antaŭ la mondmilito punis per mortigo. Mahometanoj venas en la moskeojn kun turbano surkape, sed kun nudaj piedoj, lasinte la piedvestaĵojn ekstere.

La militista saluto preskaŭ ĝeneraliĝis en esprimo per armiloj aŭ per mansalutado, kiu devenas el la antikva Romo.

La antikvaj Romanoj salutis tiel, ke ili klinis la kapon kaj levis la manon super la kapon malrekte antaŭen, kun antaŭen etendita manplato. La saluto de la nunaj italaj faŝistoj estas heredaĵo de prapatroj kaj tial ĝi tiel enviviĝis.

La salutojn per armiloj oni renkontiĝas preskaŭ ĉe ĉiuj nacioj. La negroj levas siajn lancojn same kiel la araboj la pafilojn, kaj niaj soldatoj tenas la pafilojn antaŭ si same kiel iam ilin tenis la grenadistoj de Napoleono aŭ Frederiko.

La esprimon de estimo per premo de l' mano ne konas multaj nacioj kaj ĝi eĉ ne estas privilegio de la nacioj civilizitaj. Sed ĉiokaze ĝi havas sian originon en la tenado de la malfortaj per fortaj manoj. Esence tio estas propono de siaj fortoj al la malpli fortaj.

Laŭ tio mankas ĉia kialo al opinio, laŭ kiu la manon por saluti prezentu la sinjorino al sinjoro kaj neniam la sinjoro al la sinjorino.

La ĉinoj salutas siajn konatojn distance tiel, ke ili premas per sia maldekstra mano sian propran dekstran, ridetante dum tio.

Ĉe multaj nacioj nigraj kaj brunaj oni salutas sin reciproke per falo sur la manojn, respektive sur la vizaĝon, kio ĉe ni pro multaj kaŭzoj ne estus ebla. Ie la subuloj eĉ falas sur genuojn antaŭ siaj estroj, metante iliajn piedojn sur la nukon, kiel

tion faris Vendredo el la romano Robinson Crusoe.

Al tiuj ĉi ĉefaj signoj apartenas ankaŭ kuriozaĵoj de laplandanoj, salutantaj sin per frotado de nazo je nazo — saluto, imitata laŭ la bestoj, aŭ de tibetanoj, kiuj en kelkaj regionoj, montras al ŝiaj konatuloj en plena estimo siajn eligitajn langojn aŭ tuŝas sin reciproke per la langoj, grimpante unu al la alia sur la genuoj.

Tiu ĉi esprimmaniero ne estas tre malproksima de nia kiso, kiu vekas ĉe ĉinoj kaj japanoj sentojn de malŝato kaj abomeno, ĉar tie la geamantoj reciproke karesas sin sur la dorsoj.

La negroj apud malsupra Kongo konsideras esprimon de plej granda estimo sputi en la manplaton, kion oni ne devas viŝi, se la salutito ne volas nepardoneble ofendi sian vid-al-vidon.

Ĉarma salutmaniero estis rimarkita ĉe primitiva gento de Bantoj en Suda Afriko, kiu eksidas, unu kontraŭ la alia, sur siajn kruce metitajn krurojn, kisas siajn manojn reciproke kaj balancas de flanko al flanko, eldirante la plej belajn vortojn de sia vortotrezoro. Tiu ĉi salutado kompreneble postulas tre multe da libera tempo.

(El „Esperanto dla Wszystkich")

Gravaĵoj.

Hakkaidoa Esperantisto, organo de Hakkai Centro de Esperanto Propaganda Asocio en Hokkaido, Japan., ĵus aperis.

Internacia ĵurnalo enkondukas E-on.

La semajna ĵurnalo **„European Herald"**, eldonata en London, 110 Fleet Street, London, E. C. 4., ĝis nun redaktata en angla, franca, germana, hispana kaj itala lingvoj, decidis aldoni E-on al tiuj lingvoj uzataj. Kun la numero de 28. sept. naskiĝis E.-sekcio, redaktata de Fred Wadham, Brita ĉefdel. de UEA. — Aĉetu la gazeton (en Aŭstrio 40 gr), ĉar oni daŭrigos la E.-sekcion nur, se montriĝos la necesa intereso.

Radio Brno sendos ankaŭ dum tiu vintro regule Esperanto-horeton ĉiun unuan merkredon de l' monato je 22 h 15. Krome la sendstatio Brno kun Praha II, Košice kaj Mor. Ostrava dissendos ĉiujn mardon kaj vendredon de 19 h 15 — 19 30 E'-kurson.

„La Progresanto", studgazeto de la Federacio de Laboristoj-Esperantistoj, aperis unuafoje en oktobro en Amsterdam-Z., red. F. Faulhaber, Marathonweg 15.

Progresemaj medicinaj gazetoj: „La medicina Catalana"-Barcelona kaj „Bulletin de la Société Belge d'Orthopédie"-Uccle je klopodoj de Intern. Medicina Revuo nun publikigas resumojn de siaj artikoloj en E.

Internacia Centra Komitato de la Esp.-Movado, Genève eldonis nun la kutiman kongresraporton pri Köln 1933 sub la bone konata titolo „Oficiala Dokumentaro Esperantista". 108 paĝoj.

Ĉiu legu la libron, almenaŭ tiuj, kiuj ne povis ĉeesti la kongreson mem.

Konferenco de Internacio de Proletaj Esperantistoj okazis 12.—15. aŭg. en Lille. Partoprenis 73 el 9 landoj. Plena Kongreso okazos 1935 en Antwerpen.

XIV-a Kongreso de SAT okazis en Valencia 3.—8. aŭg. Ĉeestis 376 kongresanoj el 13 landoj. Samtempe oni inaŭguris Zamenhof-straton en Valencia.

„La Insulo Tekselo Nederlando", 8-paĝa ilustrita gvidfolio eld. de Teksela Esperanto-Federacio „Kune ni venkos", Texel, Nederlando.

El Palestino.

Nia s-anino **Thea Kohn**, antaŭe en Wien, nuntempe en Tel Aviv, sendas al ni tre interesan bileton, montrante la Malfermon de Zamenhof-strato en ĉeesto de la urbestro, kiu ankaŭ salutigis Internacian Knnferencon en Wien. Sur la bildo ni bone rekonas f-inon Kohn kaj la fervoran porpagandiston el Warszawa, redakt. Bermann, kiu bonege helpis mian propagandlaboron en Warszawa antaŭ 2 jaroj. Steiner.

Novaj gvidfolioj:

„Internacia Libertempejo en Lázne Belohrad, Ĉeĥoslovakujo, julio-aŭgusto", 8 pĝ., 5 bildoj, 1 landkarto; eld. de Esperantista Klubo, 1934.

„Banurbo Aachen", 6-paĝa, kun 6 bildoj, 1934. Eld. Städt. Verkehrsamt Aachen.

„Ĉeĥoslovakio, Vysoké Tatry." Bela gvidlibro, 24 pĝ. Tre eleganta gvidlibreto eld. de Ministerio por Fervojoj, Praha kun multaj bildoj kaj du landkartoj. Vere imitinda agado de Ministerio.

La tempoj ŝanĝiĝas.

Kiel la tempoj ŝanĝiĝas! Antaŭ ol mi edziĝis, mi parolis kaj mia fianĉino aŭskultis, poste mia edzino parolis kaj mi devis aŭskulti. Nun ni ambaŭ parolas kaj la najbaro aŭskultas.

Sur la tomboŝtono de mortinta edzino oni trovis tiun ĉi tre signifan skribon: „Miaj larmoj ne redonos ŝin al mi. Jen kial mi ploras." (Laŭ „La Vivo"-Zaragoza)

»Kiam via edzino ankoraŭ vivis, vi ankaŭ vin sentis malfeliĉa.»

»Jes, sed tiam mi almenaŭ sciis pri la kialo.« (Bühne.)

»Vi do ne deziras plu edziĝi, s-ro N.?«

»Ne, mia devizo estas: Neniam ree militon!« (Deutsche Romanztg.)

Aŭstria Esperanto-Asocio
Wien I. Neue Burg, Heldenplatz

Mia vojaĝo tra Aŭstrio.

Dum septembro mi faris vojaĝon tra Aŭstrio por viziti la diversajn lokojn, kie estas grupoj kaj unuopaj samideanoj, por priparoli la venontajn taskojn kaj helpi ilin, kie tio estis necesa.

Mi komencis en Amstetten, kie estis ALLE-grupo, por fondi laŭ peto tie E-grupon. Vizitante la ŝtatan komisaron, distriktestraron, lernejestron kaj urbparoĥestron (prezidanton de la urblernej-konsilantaro) kun s-ano Kronsteiner ni trovis favoron al fondo de grupo kaj ricevis la permeson fari kurson en la lernejo.

Vizito al Steyr malnecesis, ĉar s-ano Ulbrich lastmomente skribis, ke li venos al Linz, kie ni plej detale priparolis la diversajn propagandeblecojn. Koncerne al la eldonota 4-paĝa germana teksto de AE. s-ano Ulbrich transprenis la kunredaktadon kaj krome transprenis la propagandon grandstilan en intima kontakto kun AEA sub la titolo „Propaganda fako de AEA.

En Linz ni, ges-anoj Kugler, Mraz, Ulbrich kaj mi havis kunsidon, en kiu ni priparolis la eblecon ankaŭ partoprenigi Linz okaze de Kongreso en Wien 1936. S-ano Kugler komencis enkonduki en taĝĵurnalo de Linz E.-angulon (pli bone duonpaĝon) kaj ni devas gratuli lin pro tio. Oni nun vigle eklaboris, speciale ankaŭ s-ro Mraz.

En Wels min jam atendis nia senlaca propagandisto kaj fondinto de la grupo katolika en Wels s-ro Wagnleitner. En la kunvenejo kunvenis proksimume 40 personoj, inter kiuj s-ano Franz kun 20 iamaj ALLE-anoj. Ni priparolis la fondon de neŭtrala grupo (la katolika estas ankaŭ parto de AEA, do ni havos du grupojn en Wels) kaj kun granda ĝojo mi vidis, ke niaj novaj membroj unu post la alia venis al mi kaj premante mian manon dankis al mi pro mia veno kaj interveno kaj promesis streĉan kaj amikan laboron en AEA. Mi dankas al s-ro Franz, malnova UEA-ano kaj abonanto de AE, pro liaj klopodoj, montri al siaj iamaj lernintoj, ke AEA ne estas kontraŭulo de iu ajn mondpercepto, ĉar laŭ siaj statutoj ĝi entute ne konas ian politikan sintenadon, sed nur celas unuigi la esperantistojn aŭstriajn por komuna laboro koncerne Esperanton. Post vizito ĉe la polica ĉefo, s-ro Polizeirat d-ro Baier, petinte lin, helpi la starigon de grupo, mi forveturis al Gmunden, kie mi parolis kun s-ano Holzleitner, izolulo, kiu tamen denove gvidos kurson kaj deziras helpi okaze de travetu-rado de la karavano en 1936.

Nun la vojo kondukis al Salzburg, kie mi havis longan interparoladon kun d-ro Christanell, prez. Thiel, s-anoj Lidl, Scheierl kaj Stegmüller. La Salzburg-anoj aranĝis grandstilan propagandon por la nuna sezono kaj ni esperu, ke ili bone sukcesos. Helpos ilin certe, ke en 1936 ni deziras aranĝi por la kongresanoj, venontaj el la nordo, okcidento kaj sudo, la komencon de nia 28. kun aparta programo en Salzburg. Ili deklaris sin pretaj kunhelpi en la aranĝoj. La Salzburg-anoj postulis ke la Vien-anoj entute (do ĉiuj grupoj) estu membroj de AEA. Ili ankaŭ deziris, ke ĉiu aŭstria esperantisto devige estu abonanto de AE.

En Innsbruck min atendis s-ano, kies nomon mi forgesis, sed kiu vere afable min akceptis kaj raportis, ke la prez. Kühbacher nur povos veni post unu horo, kun kiu, parte en ĉeesto de d-ro Blaas, mi priparolis la venontjaran Antaŭkongreson en Innsbruck, kondiĉe, ke la germanoj povus veni. Tio certe ankaŭ helpos la Innsbruck-anojn en la gvidado de novaj kursoj.

En Saalfelden, kie iam estis grupo, mi vizitis la lernejestron s-on Wallinger, kiu ree fariĝis aktiva membro de UEA kaj promesis en pli bona tempo (laŭ politika vidpunkto, ĉar en lia loko ĉiu agado de iu ajn asocio nun ne okazas!) denove gvidi kurson kaj fondi rondon.

En Lend mi havis longan interparoladon kun s-anoj lernejestro Neumaier kaj komunumsekr. Laukes.

Ĉe niaj viglaj s-ano en Klagenfurt mi priparolis la tutajn aranĝojn de Antaŭkongreso 1935. Vizito al ŝtato komisaro komerca kons. Wolf, direktoro de Landa Fremdultrafik-oficejo d-ro Frank kaj referanto de klerigfako en Laborista Ĉambro d-ro Haselbach. Rezultoj: Kursoj, eldono de E.-gvidfolio kaj certe bona aranĝo de la Antaŭkongreso. Dankon al prez. Müller, fakinstr. Schmidt kaj s-ano Komposch.

Kiel lastan lokon mi vizitis Knittelfeld, kie ĝis nun nur estis ALLE-grupo. Ĉeestis pli ol 20 personoj kaj 7, inter tiuj 4 membroj de UEA., deziris fondi grupon. Venonttage mi iris kun s-ano Peisl al la ŝtata komisaro kaj al la ĝendarm-posteno, por anonci tion kaj peti pri nemalhelpo je okazigo de E.-kursoj.

Al la koncernaj distriktaj estraroj nun la skriba anonco pri fondo de grupoj de AEA en Amstetten, Knittelfeld kaj Wels jam estas senditaj kaj ni esperas, ke grupoj baldaŭ ekfunkcios, por disvastigi E.-on en siaj distriktoj! Steiner, prez. de AEA.

Esperanto en la kursprogramo nunjara:

Wien: Urania, Volksbildungshäuser, Konsularakademie, Kaufm. Wirtschaftsschule (früher Handelsschule) Schremmer.

Klagenfurt: Arbeiterkammer.

Linz: „Tagblatt" publikigis unuafoje la 15. de sept. duonpaĝan rubrikon „Esperanto", redaktitan de s-ano Jos. Kugler. Koran gratulon pro tiu bonega propagando.

Esperanto-Prüfungen.

Die Prüfungen beginnen am 5. November um 8 Uhr früh mit der schriftlichen Prüfung im Gebäude der Bundeslehrerinnenbildungsanstalt in Wien I. Hegelgasse 14. Die Zeit der praktischen und mündlichen Prüfungen wird den Prüfungswerbern einzeln bekanntgegeben. Die mit 1 S gestempelten Gesuche um Zulassung sind his längstens 20. Oktober bei der Direktion der Prüfungskommission in Wien I. Dr. Ignaz Seipel-Ring 1 (Stadtschulrat), Zimmer 53, einzubringen. Die Prüfungsgebühr von S 20— für die Lehramtsprüfung und von S 10.— für die Kenntnisprüfung ist vor Beginn der schriftlichen Prüfung im Prüfungsraume zu erlegen.

Die Prüfungsvorschrift ist beim Bundesverlag in Wien I. Schwarzenbergstraße 5 für S 3.10 erhältlich.

Hauptversammlung.

am 14. Oktober 1934.

Genauer Bericht geht allen Gruppen zu.

Auf Grund der Zuwahlen besteht der neue Vorstand aus folgenden Personen:

1. Vorsitzender: Reg. Rat Hugo Steiner
2. Vorsitzender: Dr. Anton Brunauer, Generaldir. des Kath. Schulvereines
3. Vorsitzender: Sektionschef a. D. Doktor Franz Übelhör

1. Schriftführer: Dr. Alfred Engländer, Advokat
2. Schriftführer: Richard Kreutel

1. Kassier: Ernst Werner
2. Kassier: Felizitas Basler

Schulreferat: Landesschulinsp. a. D. Hofrat Dr. Fr. Wollmann und Schulinsp. a. D. Reg. Rat Fritz Stengel

Kulturreferat: Nikolaus Hovorka, Verleger

Organisation: Reg. Rat Stengel, Maria Fiedler

Propagandadienst: Rudolf Ulbrich, Postbeamter, Steyr

Protokollist: Adolfine Felzmann

Statistik; Josef Witzmann

Kun ĝojo estis konstatate, ke ĉiuj aŭstriaj grupoj aliĝis al AEA. Por 1935 la organizo devos esti pli firma.

AEA: Steiner, d-ro Engländer

Grupo Klagenfurt: Novelektoj: Otto Müller, prez.; fakinstr. L. Schmidt, vicprez.; Paul A. J. Komposch, St. Veiter Ring 5 (kien ĝiuj skribaĵoj estu sendotaj), sekr.; Rud. Engler, vicsekr.; R. Schacherl, kas.; Hans Slocker, vickas.; Rud. Blasche, arĥ.

„Ni konsentas la proponitan novestraron kaj al nova paĝmaniero, sed ni demandas, kial oni aranĝis tian novpaĝon. Ni opinias, ke per nedeviga mendo de la gazeto, tiu ne plu eble povos aperi. Ni mem estas pretaj por ĉiu ano de nia grupo kiel ĝis nun mendi po unu ekzemplero. Müller, Komposch."

Ni gratulas la grupon por ĝia kompreno de necesa deviga abono kaj bonega disciplino. Kelkaj aliaj grupoj certe same agos. Esperanto-Klub Wien kun nun preskaŭ 80. membroj same agas. AEA.

Esperanto-Klub kommt jeden Donnerstag um 19 h 30 im Extrazimmer Café Industriepalast, I. Dominikanerbastei 22, zusammen. Jeden 2. Donnerstag im Monate großer Vortrag im Café Siller, I. Schwedenplatz, genau 20 h. Wegen des Feiertages im November erst am **22. November** Lichtbildervortrag Reg. Rat Steiner in Deutsch und Esperanto über **„Lettland und Finnland"**. Eintritt frei, Gäste **willkommen!** — Die Klubmitglieder werden ersucht, mindestens zweimal monatlich den Klub zu besnchen.

Wien: E-Verein Danubio: 22. X. A. Denks: El kongresparoladoj de nia majstro, d-ro A. Mildwurf: 50 jaroj kokaino; 29. X. Parolata E.-gazeto, parolos prez. P. Cech, Rud. Huber, d-ro A. Mildwurf, d-ro E. Pfeffer, Fr. Vasta kaj Alf. Klein.

Gratulon

al nia s-ano **Dr. Norbert Hofer** okaze de lia 60. naskiĝtago kaj 35. datreveno de sia pastriĝo.

Geedziĝoj:

Rajmuud **Cech**, prez. de E.-grupo Danubio, kun s-anino Lizzie **Schicketanz.**

Walter **Mudrak,** vicprez. de Katolika Uniĝo Esp., kun s-anino Maria **Mildschuh**. Nia multŝatata s-ano eksprovincialo de la Piarista Ordeno, konsistoria konsil. P. Franz de Meŝtan aparte venis el Krems al Wien, por geedziĝi la paron; la alparolado okazis parte en Esp., parte germane.

Elkoran gratulon! AEA: Steiner.

Deziras korespondi:

S-ro Satoo-Norikata, 865, Sunĵi, **Yata-mura,** Nakakaŭaĉi-gun, Osaka-fu, Japanujo, per il. pk. kaj let.

S-ro Mario Braga, Rua dp Ouvidor, 15-20, **Rio de Janeiro,** Brazilo (il pk.).

16 **estonaj** gegimnazianoj 14-20 jaraj deziras korespondi per poŝtkartoj aŭ leteroj. Skribu al s-ino Hilda Rebane, **Narva,** Vestervalli 34, 3, Estonio.

Rimarkindaj presaĵoj

Bonhumoro de Paul Nyssens. Esp.-igita de la aŭtoro mem laŭ originala franca verko. Ĉe la aŭtoro, rue Froissart 129, Bruxelles; 177 pĝ., prezo ne montrita, 1933.

Kiel vojon al la bonhumoro la aŭtoro vidigis la kombinon de konfido, espero kaj homamo kun la ĝusta meza stato inter submetiĝo kaj animsendependeco. Li konsilas memtrenadon laŭ 31 reguloj (p. 97-116) kaj konstatas, ke la efikoj de bonhumoro estas fizika kaj morala sano. Post klarigo de la ĉefaj higienaj ordonoj rilate nutradon, spiradon ktp. nia apostolo priparolas la sintenadon de ĉiusence sana homo kaj fine priskribas la gajnakiraĵon per sia sistemo: veran ĝojon.

La verkinto certe estas ano de memsugestado kaj profunde konas la verkojn de la anglo-amerika novspirita skolo, kies citemon li plenamplekse imitas. Sed kiel liaj antaŭuloj li ne vidas, ke melankoliulo ofte eĉ ne deziras interrilaton kun aliaj kaj ke serĉante konsolon, li bezonas patrinan animon, kiu, komprenante liajn ĉagrenojn, neniel bagateligas ilin. Ankaŭ tion li nepre ne atentas, ke por profunde sentanta homo ne nur liaj propraj suferoj estas fontoj de malĝojo, sed kelkfoje eĉ pli tiuj de liaj kunhomoj, kies feliĉigo aliflanke povas donaci al ni pli grandan ĝojon el la plej delikata spirita ĝuo. La vorto „amo" ja troviĝas en la verko de Nyssens, la pli supera „kompato" mankas, ĉar ĝi ŝajnas al li tro sentimentala.

Lingve precipe okulfrapas kelkaj galicismoj, parte ankaŭ anglicismoj: anstataŭo de „k" per „c"-formoj. Stranga estas la uzo de neŭtra pronomo post vorto laŭsignife duseksa (homo ktp.), kie vivantaj lingvoj samkiel mortintaj uzas la maskulinan formon. Krome mi konstatis intermiksadon de „vanta" (morala kvalito) kun „vana" (senefika), da la transitiva „bezoni" kun la netransitiva „necesi". La ofte en la verko uzata „diligenti" (sich befleissen, klopodi) same „jepensi" estas iom nekutimaj. Anst. „mema" oni skribu „propra". Malsano estas „akuta" sed ne „akra". „Drohne" estas „virabelo" aŭ „fuko" (ne „vespego"). Al p. 168 mi aldonu al la piednoto: „entuziasmo" laŭ greka etimologio egalas al „diozeco". Iom da atento ankaŭ rilate la refleksivon, akuzativon kaj la uzadon de -ig kaj -iĝ! Bonaj esperantigoj estas: p. 20 posttempa (ankaŭ „nelaŭtempa", eĉ pli bone, ĉar „post-tempa" krome havas gramatikan sencon), p. 48 konsenti krediton (laŭ franca esprimmaniero; germane „zugestehen", p. 89 sendevigi (g. „der Pflicht überheben"); p. 91 iu ŝuldigas nin (wir stehen in jem-s Schuld); p. 103 homoegaleco (Ausgeglichenheit); p. 113 senbridigi (entfesseln, ĉikaze eble tro forta esprimo); p. 120 antaŭmalhelpo (Vorbeugung)! p. 140 konvenigi (anpassen); p. 165 senmalice (harmlos, sed Arglosigkeit p. 156 pli bone estas „nesuspektemo"). Pli mallonga ol „malŝanĝebligi" (p. 147) estus „stabilizi". Dro Biehler.

Literatura Mondo, Budapest. Enciklopedio de Esperanto. I. Volumo A-Ĵ. Redaktis L. Kökeny kaj V. Bleier, la lingvo-fakon K. Kalocsay. Iniciatinto-ĉefredaktoro: I. Ŝirjaev. Kunlaboris 107 konataj, esperantistoj de ĉiuj tendencoj de la movado. Sur 272 tekstopaĝoj troviĝas 1100 titolvortoj kaj sur 112 bildpaĝoj preskaŭ 300 bildoj. Formato 23 . 15 cm.

Prezo kun la baldaŭ aperonta dua volumo, kiu enhavos proksimume 350 teksto kaj 160 bildopaĝojn, broŝ. svis, fr. 30.-, bind. 34.- plus 10 % sendkostoj. Pagebla en du partoj.

La du volumoj kune estas la sesa verko de AELA por 1933.

Per tiu verko la esperantistaro ricevis gravan helpilon en sia propagando, kiun ili jam ege deziris kaj bezonis. Admirindaj estas la granda diligenteco, per kiu la tuta materialo estis kolektita, kaj la vere granda entreprenemo kaj kuraĝo de la eldonantoj. Ni danku al la eldonejo kaj al la kunlaborintoj plej bone per tio, ke ĉiu iom serioza esperantisto kaj ĉiuj grupoj havigu al si ĉi tiu unikan verkon! Steiner.

„Arthistorio" de Anton Hekler, tradukis K. Kalocsay. La E.-eldonon prilaboris A. Kampiss. 102 paĝa belega verko kun multaj belaj bildoj sur luksa papero, 1934.

„Infanoj en Torento" skizo de Stellan Engholm, 116 paĝa, 1934.

Denove L. M., tiu vigla eldonejo, donacis al la E.-publiko du belajn verkojn. Tiu ĉi publiko ne estu maldanka kaj aĉetu la verkojn!

Norda Literaturo, kolekto de literaturaj verkoj el Norda-Eŭropo. Redaktas T. Indra, ĉefdel. de UEA. por Latvio; eld. K. Strazds, Jelgava, Latvio. — Ĉiu kajero estos proks. 80 paĝa kaj enhavas bonkvalitajn verkojn de la plej bonaj naciaj verkistoj. El 6 kajeroj fariĝos dika, tre valora libro. — Oni ne devas antaŭpagi la abonon, sed pagas nur post ricevo de ĉiu kajero la sumeton da aŭ. S. 1.— inklusive afranko al la aŭstria reprezentanto: Aŭstria Esperantisto.

Ĵus aperis la unua valumo, recenzota en la venonta numero.

Presejo „Helmond" en Helmond, Nederl. dissendas invitilojn al antaŭmendo de „Roman-Biblioteko". Oni intencas aperigi: Blua sango de Willy Wood, La Morea Perlo de D. Simson, Irisis de Henry 't Sas, Sub la Vitra Kupolo de L. van Weddingen, La Sekreto de la Dalai Lama de J. H. Degreef kaj Perforta Forkonduko en la Harz-montaro de Arvoitus. Ĉiun monaton aperu 1 romano po 200 paĝoj, belaspekta je prezo da sv. fr. 1.20 plus 20 ct. afranko laŭ la nombro de la menditaj kaj antaŭpagotaj libroj.

Sennacieca Asocio Tutmonda, Paris.

Nova adreso: Paris 20, 67 ave. Gambetta.

(Alvenis po 1 libro):

„Skizo pri filozofio de la homa digno“ de Paul Gilles, prof. ĉe Belgia Instituto por altaj studoj (traduko de E. Lanti), 148 paĝoj, formato 13×19 cm. Prezo broŝ. fr. fr. 12.—, plentole bind. 17.— plus 10 % afranko.

„Petro“, kursa lernolibro, 6. eldono (nova kompostaĵo) 116 paĝoj, 12×17 cm. Prezo broŝ. fr. fr. 6.— plus 10 % afr.

„Jimmie Hyggins“ de Upton Sinclair, traduko de Karl Fröding, 375 paĝoj de teksto dense kompostita, formato 13.19 cm., broŝ. fr. fr. 22.50 plentole bindita 29.— plus 10% por afranko.

Eldonejo N. Ŝapiro, Warszawa.

„Socialismo ĝia ideologio kaj realigo“ de d-ro S. Chazan, 47 paĝa.

„Kantoj de l' amo kaj sopiro“ de Eugeno Miĥalski, L. K.; kolekto de originalaj sersoj; 1034, 48 paĝa, interesa kovrilo.

Ĉe ambaŭ libroj prezoj ne aldonitaj.

Eldonejo „Vegetarano“, Bucuresti, str Dr. Istrate 10.

„La influo de vegetarismo al la morala kaj socia progresado“ de Karl Nebenzahl. Nr. 1 de Biblioteko „Vegetarano“; 34 pĝ. malgrandformate; 2 fr. fr.; 1934.

Pola Esperanto-Asocio Warszawa.

„Marŝalo Josef Pilsudski“ de W. Sieroszewski, prezidanto de Pola Literatura Akademio, trad. de Mgr. fil. B. Strelczyk. 54 pĝ., 1934. Prezo o. 80 svis. fr.

Vere interesa libro, ĉar ĝi pritraktas marŝalon Pilsudski, kies nomo ne estas disigebla de la nuntempa pola ŝtato. Kiu deziras konatiĝi kun Polujo, ties internacia situo kaj politika historio, nepre legu la libron Bona bildo de l' marŝalo kaj bela ekipo.

Eld. Internationaler Holzmarkt, Wien.

Nia s-ano Plehn, teknika oficisto en la segilfabriko Wüster & Co. Wieselburg prilaboris „Segil-Vortaron“ en la lingvoj germana-angla-franca-itala-Esperanto. Ĉi estas ordita laŭ la internacia dekuma klasifiko. La vortaro antaŭe estis publikigita en la fakgazeto „Internationaler Holzmarkt“-Wien.

Frekventu regule viajn grupkunvenojn! Portu ĉiam la stelon!

Peto al miaj amikoj!

Mi kolektas vidaĵkartojn el la tuta mondo, uzitajn kaj neuzitajn. Mi estus tre danka al miaj amikoj, se ili sendus tiajn al mi, mem ne kolektante il. pk. Dankon antaŭe!

Steiner, Wien, I. Neue Burg.

Posedanto, administranto, eldonanto kaj respondeca redaktoro Regierungsrat Hugo Steiner, Bisamberg, Bundesstr. 154. — Presejo: S. Falk, Wien, XIII, Nobilegasse 4.